

VIVO

Kion deziras la ĵus naskiĝinta bebo, se ne vivi?

Kiam gejunuloj sportas, studas, ridegas, ŝercas, agadas, vigle parolas, streĉe celas al la sukceso, ege manĝas kaj trinkas, senĉese moviĝas, oni diras pri ili: kia vivo!

Kiam knabo morte kuŝas, senmove, senrideta, senvive, kia aĉa vidaĵo, vere korŝira kaj eĉ neeltenebla.

Jes ja la homo volas vivi kaj senfine.

La vivodeziro estas enskribita, enradikigita en lia koro, en lia karno.

Ne estas strange, ke en la tuta biblio, tiu temo ĉie retroviĝas, elŝprucas, svarmas, revenas.

Dio estas viva Dio, Dio de la vivo kaj de la vivo eterna.

Dio estas la kreinto kaj la ĉiam kreanto kaj por ĉiam kreanto de la vivo. Sen Li, nenio.

Kun Li, ĉio.

El la Malnova Testamento aŭskultu nur la profeton Jesaja: "Ĉu vi ne scias, ĉu vi ne aŭdis, ke la Eternulo estas Dio eterna, la Kreinto de la finoj de la tero? Li ne laciĝas kaj ne senfortiĝas; Lia saĝeco estas ne explorebla." (40,28)

Sed tuj ni rigardu en la Nova Testamento. Tamen ni povas pluki nur en kelkaj libroj, ĉar alie ni bezonus tutan kajeron por entenigi la frazojn, kiuj elvokas aŭ asertas la vivon.

Por Jesuo la vivo estas pli ol la nutraĵo (Mt 6,25), ĉar pli gravas savi vivon ol obei sabaton (Mk 3,24), ĉar Dio estas "Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj" (Mk 12,27).

Li ne nur parolas pri la vivo, sed ankaŭ Li kreas ĝin: memoru pri Lazaro (Jo 11), la filino de Jairo (Lk 8,40-55), la sola filo de la Naina vidvino (Lk 7, 11-15).

Plie Li ne nur kreas la vivon, sed ankaŭ estas ĝi.

"En Li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj" (Jn 1,4). Li estas la "vorto de vivo" (1 Jn 1,1). "Kiel la Patro havas en Si mem vivon, tiel Li donis al la Filo ankaŭ, ke ĉi tiu havu en si mem vivon" (Jn 5,26). Ĉu la akvo, kiun Li donas al ni, fariĝos en ni fonto de akvo ŝprucanta supren por eterna vivo (Jn 4,14).

Jes ja nia Jesuo Kristo kaj Sinjoro estas la Vivo, la Fonto de la Vivo.

Ĉiu el ni priploras mortintan amikon, patron aŭ patrinon. En ĉiu familio mankas iu.

Kial ne kanti kiel kantas la Eklezio:

"La vivo estas Via kaj tute ne la mort'

Kun viaj homaj fratoj ja estas via sort'" (Kantiko S 1).

"Vivas Vi kaj sen fin'

Al Vi, Dio, nia laŭdo

Por ĉiam kaj por eternec'" (Kantiko S 6).

"Sinjor' Jesu'

Vivas ja Vi

En Vi la ĝojo eterna!" (Kantiko J 16).

Je Pasko, Festo de la Ĉiama Vivo, ni danku al nia Viva Dio.

Roger DEGRELLE.

KRISTANA SOLIDARECO

Ni vivas hodiaŭ en socio kun belaj kaj varmaj domoj, televido kaj rapidaj aŭtomobiloj, kun libertempaj vojaĝoj al fremdaj landoj, kun sekuro kaj certeco de naŝkiĝo ĝis morto, kun komforto, kigieno kaj mono, sed ĉu ni vere vivas en bonfarta socio? Malriĉuloj, kiel en la pasinto, en nia nuna socio konsumas ne plu troviĝas, sed ĉu ni vere vivas en bonfarta socio? Neniu el ni kuraĝos jesiti tion. Nia socio tute ne estas kontentiga. En ĝi troviĝas, en ĉiuj fakoj, multaj gravaj malhelpoj ĉe la vojo al feliĉo.

Ĝuste sur la tereno de Eŭropo kaj paco, la situo fakte ne estas kontentiga. Tridek jarojn post la dua mondmilito ankoraŭ ne ekzistas, malgraŭ sincera kaj senlaca laboro de miloj da fervoraj idealistoj, eŭropa unueco; Eŭropo dividiĝas per linio desegnita de du sociaj kaj politikaj sistemoj tute diversaj kaj malamikaj. Kaj la paco? Tridek jarojn post la milito en nia kontinento estas paco nur ĉar du gigantaj armeoj, armitaj per la plej modernaj kaj celtrafaj bataliloj, ankoraŭ ne ekbatalis, ĉar ili timegas unu la alian pro la kruelegaj sekvoj por si mem. Ĉiutage niaj gazetoj, radio kaj TV raportas pri ĉiaj kvereloj kaj konfliktoj. Kie estas la vera, aŭtenta paco?

Ni ne estas tiel bonfartaj kiel ŝajnas: ŝajno trompigas. Ĉu ni ne perdassian personecon en la hodiaŭa industria socio estrata de teĥnokratoj? Nia amasa socio faras el ni senkarakterajn ciferajn. Ni fuĝas el niaj modernaj sed malsamaj kaj bruegaj urboj. Malgraŭ la eltrovemo de scienculoj, en ĉiuj fakoj de la ekonomia vivo ĉie kreskadas grandega senlaboreco: miloj da gejunuloj timas la estonton: kie ili trovos laboron? Tamen ni ne rajtas malesperi. Ni devas - ĉefe ni, esperantistoj, idealistoj - daŭrigi niajn klopodojn por plibonigi la situon. Ni ne devas esti kontentaj je la nuna bonfarto, kiu fakte estas nur surrogato, sed nepre devas krei socion kaj komunumon vere bonfartan. La vojo al tiu socio vere bona kaj kontentiga povas esti tiu de la kristana solidareco.

Kio estas tio? "Solidareco", "solidara" estas vortoj ofte malĝuste uzataj. Ili facile fariĝas kriegoj sur la socia kaj politika merkato. Ili devenas de la latina "solidum", kiu signifas "tuta". Solidareco signifas la rekonon de ĉies ecoj, bonaj kaj malbonaj, de personoj, ankaŭ de grupoj kaj nacioj. "Esti solidara" signifas propravole limigi sian ekzistadon pro la bonfarto kaj feliĉo de aliaj homoj kaj de la komunumo. La bazo de solidareco estas unuflanke ĉies libereco kaj aliflanke ĉies respondeco. Ĉiu rajtas ja plene evoluigi, en libereco, sian ekzistadon, sed devas ankaŭ porti sian respondecon, ne nur por si mem sed ankaŭ por la aliaj, por la komunumo.

Sekve, la solidara socio estas socio en kiu ĉiuj personoj tute agnoskas sian reciprokajn ekzistadon, kun siaj rajtoj, devoj kaj postuloj, kun ĉiuj siaj eblecoj, personaj trajtoj. La solidareco do ne forigas la limojn inter la homoj kaj la grupoj, sed rekonas ĉies ecojn kaj kutimojn. Trans la naturaj limoj ĝi donas la manon de helpemo kaj komprenemo. La solidara homo helpas ĉiun homon esti kaj resti si mem, kun sia tasko kaj esprimo, vivmaniero kaj sintenado. Per tiu rekono de la propraj rajtoj kaj eblecoj de la aliaj homoj li tamen samtempe rekonas kaj plifirmigas sian propran ekzistadon. Solidareco estas komprenemo kaj reciproka helpado: de mi al la aliaj, de la aliaj al mi.

La tereno de la solidareco estas tre vasta. La solidara ideo estas praktikebla ĉie, ĉiam kaj ĉiel. Ĝi nepre devas esti praktikata en ĉiuj rondoj de la homa socio: en la familio la infanoj povas esti solidaraj kun la gepatroj kaj la gepatroj kun la infanoj; en la laborejo la laboristoj ne nur kun la kolegoj sed ankaŭ kun la estroj; solidareco povas esti praktikata en la lernejo, en vilaĝoj kaj urboj, sur la vasta tereno de la sporto, en arto kaj scienco, en ĉiaj unuigoj kaj ligoj, asocioj kaj institutoj.

Ĉu ne tuj montriĝas, ke ĉi tiu ideo pri solidareco estas kristana ideo? Ĉu ĝi ne efektivigas la kristanan ideon pri amo al la proksimulo? Solidara kunlaboro, kie ajn, signifas ja helpadon, en kompreno, de la proksimulo, eĉ per la limigo de la propra bonfarto kaj do vera realigo de la granda leĝo de Kristanismo kaj de la Eklezio. La solidara ideo tamen samtempe estas reala kaj natura ideo. Ĝi ankaŭ estas sintenado de kristana realeco: ĝi agnoskas la realan kaj naturan ekziston de la proksimulo tia, kia li estas, individuo kaj grupano. Tiun naturan kaŝsan realecon kompranas, helpas kaj subtenas solidareco, konstruante pontojn, farante kontaktojn, donante la manon trans ĉiaj limoj. Tial ĝi malakceptas la klasan batalon; male, ĝi helpas la kunlaboron de la diversaj klasoj kaj por la bono de tiuj klasoj kaj de la granda komunumo.

Ĉu vi miras, ke ĉi tiu ideo kristana, por pli bona socio, estas la rezulto de la studado de katolika pastro? La germana Jesuito Heinrich Pesch, kiu mortis antaŭ kvardek jaroj, formulis ĝin en siaj verkoj, inspirita de la papaj enciklikoj. Ĝi ne estas nun foruzita, malnova doktrino, sed sufiĉe freŝa kaj fruktodona ankaŭ por nia tempo kaj la estonto. Ĉi tiu kristana solidareco, ĉie, ĉiam kaj ĉiel praktikebla, estas tio, kion ĝuste bezonas nia malsana, disŝirita Eŭropo kaj nia malvera paco. Ni devas rekoni unu la alian - pro nia amo al la proksimulo - kaj tiel helpi unu la alian evoluigi ĉiujn proprajn eblojn, sociajn kaj kulturajn, spiritajn kaj materiajn, ne nur kiel individuoj sed ankaŭ kiel sociaj grupoj, komunumoj kaj popoloj. Nur la kristana solidareco efektiviĝos la veran eŭropan unuecon, kiu estas la idealo de ni ĉiuj, kaj samtempe la veran, aŭtentan pacon inter la unuopaj homoj kaj inter la grupoj de la socio kaj la nacioj de la mondo.

Ni devos lerni vivi laŭ la principo de ĉi tiu kristana solidareco kaj praktiki ĉi tiun valoran ideon en ĉiuj rondo kaj fakoj de nia komunumo. Ĉu ne estas evidente, ke valorega helpilo por la praktiko de la kristana solidareco estas nia IL Esperanto? Ĝi povas esti - kaj certe ĝi estos - la reala, praktika ponto al la proksimulo alilingva kaj alilanda por komprenemo kaj helpo reciproka.

Gesamideoj, nia bonfarto estas grandparte falsa, nia luksa kaj brilega komforto ne povas tute kontentigi niajn korojn. Ĉu ni ne sentas tian ĉiutage? Ĉu ni fakte ne estas, malgraŭ ĉia komforto, en iu senco eĉ malriĉuloj, ĉar mankas al ni la plej gravaj aĵoj? En solidareco sur la fundamento de Kristanismo - amo al Dio kaj al nia proksimulo - ni povos efektiviĝi la grandajn sonĝojn pri unueca Eŭropo kaj vera paco. Ĉi tie en Banneux, ni ekmarŝu tiudirekten. La Virgino de la Malriĉuloj, de ĉiuj, kiuj bezonas komprenon, helpon, varmon kaj subtenadon en siaj grandaj kaj malgrandaj mizeroj, montros al ni la ĝustan vojon.

W. A. M. van HEUGTEN.

=====

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO (13/3/77)

Ĉeestas: S-toj BOURDON kaj DEGRELLE, F-to MARMOU, S-inoj MICHAU kaj VINCENT, F-inoj PREUX kaj VANNEAU, S-roj DESPINEY kaj VILLENEUVE.

Observanto: S-ro BERNARD.

Petis senkulpigon: S-ro COLAS, kiun S-to DEGRELLE anstataŭas kiel vicprezidanto.

IKUE. Malĝoje ni eksciis la forpason de S-to PARUZEL. S-ro COLAS sendis kondolencan leteron al la gvidanto de PKUE.

Pluraj el ni aŭskultis la elsendojn de Radio-Vatikano kaj letere dankis. Espero Katolika: ni kontente rimarkis plibonigon. Tamen, ĉu estas necese uzi tiel luksan paperon?

FINANCOJ. S-ino VINCENT klarigas la bilancon por nin gvidi en la elekto de antaŭvidotaj elspezoj.

FKEA-KONGRESO 1977. Ni detale aranĝas la programon, ĉefe pri la vesperoj kaj debatoj: dimanĉe LA PREGO (gvidos S-to BOURDON), lunde NIA ATESTO meze de la esperantistoj kaj meze de la Eklezio (gvidos R. DESPINEY)

RENOVIGO DE TRIONO DE LA KONSILIO. La kvar elirantoj rekandidatiĝas, nome: S-ino MICHAU, F-ino PREUX, S-ro VERON kaj S-ino VINCENT.

DISERVO DUM LA LANDA KONGRESO. S-ro LEYDER el Grenoble trovis taŭgan lokon. S-to DEGRELLE rilatos kun S-ro BACHELIER por prepari la ceremonion.

EKUMENA INFORMILO. Nia sekretario prezentas la proponon de S-ro CHAMPS, presisto en Mantes. La konsilio decidas mendi 5000 ekz. de la porjunulara informilo. S-ro DESPINEY informos S-ron BACHELIER pri tio.

KANTIKAROJ. S-to DEGRELLE kaj S-ro BERNARD daŭrigis sian laboron. S-to DEGRELLE transdonas al ni multajn novajn tradukaĵojn. Ni plezure inaŭguros ilin en La Houssaye.

FRANCLINGVA ELDONO DE LA VERKO DE PATRO KORYTKOWSKI. S-ro DESPINEY prezentas la dosieron. Unue ni ĝojas, ke nia amiko A. RIBOT plenumis la tradukon kaj ni direktas al li niajn varmajn gratulojn. Poste, konsiderante la altan prezon de la eldono, ni opinias, ke ne eblas konservi en la franca eldono ĉiujn

./...

Jean CHAPPELLIER en la kongresoj.
20/2/1977

senĉese belos elvokiva:
Mortinta panjo, ĉiam viva.
19/3/1977

TRA LA GAZETARO.

De kelka tempo, la katolika gazetaro montriĝas pli atenta je la lingva problemo, speciale pri la Esperanto-eventoj. Tion montras la diversaj informoj kaj artikoloj aperintaj en "Messages", "La Croix" kaj ĉefe "Le Journal de la Paix". Estus bone, ke niaj anoj legu almenaŭ tiun ĉi lastan kaj reagu je la apero de tiaj artikoloj. Journal de la Paix 89, r. du Cherche-Midi 75006-PARIS.

KURSOJ GVIDATAJ DE NIAJ ANOJ (daŭrigo)

BOERSCH: S-ro MATZINGER gvidas la perkorespondan kurson de la orienta federacio.

ECROUVES: S-ro GREINER gvidas publikan kurson.

ROUBAIX: en la Domo de la Paco, S-to BOURDON gvidas kurson al 8 gelernantoj.

VERETZ: S-ro LECOCQ estas la ĝenerala gvidanto de la perkoresponda kurso de la fervojistoj. La komencantoj uzas la libreton de D-ro Denoël en 10 lecionoj. La progresantoj uzas la foliokurson de SFPE, ĝisdatigitan.

Daŭre sendu informojn pri via(j) kurso(j) al la redakcio. Dankon.

INFORMOJ.

- 1) Dum la landa kongreso okazos ekumena Esperanto-diservo la 29-an de majo je la 17.30 en la salonego "Centre oecuménique St-Marc" 1, pl. Louis Juvet
GRENOBLE
- 2) Esperanto-semajnoj de ARPE (Assoc. Routiers Pèlerins par et pour l'Esp^o). De la 1(-a de majo ĝis la fino de junio ĉe Valo d' Abondance en la ĉirkaŭaĵo de Thonon kaj Evian (980 m). Oni antaŭvidas finsemajnajn vizitojn kaj pli longdaŭrajn restadojn, simplan, malmultekostan akcepton, eventuale pli komfortan gastigadon en la gastejoj apud nia lignodomo. Informojn sendas:
ARPE 25, Cité St-Martin 34000-MONTPPELLIER.
- 3) Nia longjara membro kaj kuntradukanto de la kantikoj aperintaj en nia kantikaro, Roger BERNARD, ricevis la Akademiajn Palmojn pro sia kontribuo al la pliriĉigo de la franca literaturo pere de Esperanto; Ni sincere kaj amike gratulas lin.
- 4) La ĉi supre aluditaj kantikaroj estas je via dispono ĉe S-to DEGRELLE 11, Cours Léopold 54042-NANCY CEDEX c.c.p. NANCY 714 95 P (25 F afrankite).
- 5) RADIO VATIKANO: ekde la 2-a de januaro 1977, ĝi dissendas programon en Esp^o dimanĉe de la 22.05 ĝis la 22.15 laŭ la jenaj frekvencoj:
mezlongaj ondoj: 1529 khz; mallongaj ondoj: 6190, 7250, 9645 khz.
- 6) Tre taŭgaj por informado estas la 9-tekstaj glumarkoj mendeblaj ĉe UFE c.c.p. PARIS 855 35 D. 7 folioj (63 glm) kostas 6 F afrankite.
- 7) Ĝus aperis nia unua informilo "Jeune chrétien" disdonenda al ĉiuj kristanoj, katolikaj kaj protestantoj. Petu ilin grandkvante de S-ro R. DESPINEY. Bonvolu sendi al li kelkajn poŝtmarkojn por la sendkosto.

ELDONA FONDUSO (3-a listo)

- 8) S-ro Thiollière (2-a sendo): 50 F. Antaŭa sumo: 356 F. Entute: 406 F.
Plej koran dankon al ĉiuj donac-intoj kaj -ontoj.

ROZKOLORA KAJERETO.

G-roj GREINER kaj liaj infanoj ĝojas anonci al vi la naskiĝon de nova esperantistino Elina, Dianta en Ecrouves la 9-an de Februaro 1977. S-to Degrelle baptis ŝin en Esperanto. Koran bonvenon al ŝi!

